# AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE

## AUTUMN BULLETIN – 1962

ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, 114 W. 16 ST., NEW YORK 11, N. Y.


# RAPORTO PRI 51-A KONGRESO DE EANA

***PORTLAND, OREGON, 20 - 23 JULIO, 1962***

### BELA RENKONTIĜO EN LA URBO DE ROZOJ



De la 20a ĝis la 23a de Julio, Esperantistoj de la foraj anguloj de Usono kaj Kanado – British Columbia, California, Florida, Massachusetts, New Jersey, New York, Oregon, Puerto Rico, Washington – renkontiĝis en Portland, la urbo de Rozoj. En la granda, luksa hotelo Multnomah, kie okazis la kunvenoj, oni eĉ kolorigis la rozojn verdaj honore al Esperanto! La vetero, kiu ĵus antaŭ la Kongreso donis la impreson, ke jam estas vintro, subite ŝanĝiĝis kaj la Kongreso ĝuis hele sunbrilajn tagojn.

La eroj de la kvar-taga programo respegulis la interesojn de la kunvenintoj, kaj estis aranĝita de EANA en kunlaboro kun la membroj de la nova Esperanto-Grupo ESPO (Esperanto-Societo de Portland, Oregon), kiu konsistas plejparte el energiaj kaj talentaj novaj Esperantistoj. Estis serio de tri lecionoj en Esperanto, farita laŭ la mondfama rekta metodo Cseh, prezentita de S-ino Doris T. Connor. Membroj de la Kongreso por la unua fojo vigle reagis al la konata admono "*Parolu forte, kuraĝe kaj elegante*", kaj ridis pri la humorplenaj rakontoj de la "*inteligenta azeno*" kaj la "*muŝoj en la biero*". Pro la fakto, ke ESPO planas aktivan aŭtunan sezonon de kursoj en Portland, diversaj membroj volis informiĝi pri sukcesaj metodoj instrui Esperanton, kaj ili intencas utiligi la spertojn gajnitajn dum la Kongreso. (Kiel flankafero, ni observis, ke neesperantista instruistino de la Eduksistemo de Portland ankaŭ partoprenis la lecionojn. Poste ŝi diris, ke ŝi fakte lernis multajn interesajn artifikojn por utiligi en siaj regulaj kursoj.)

En la kongresa programo estis ankaŭ raportoj pri Tutlanda Esperanto-agado, kiujn donis S-ro George Alan Connor, Ĝenerala Sekretario de EANA, kaj delegitoj de Esperanto-Grupoj tra la lando: por Fort Lauderdale, Fla., S-ino John Froid; por Portland, Tom Davidson; por Oregon City, Anne Whitteker; por New Jersey Esp-Asocio, J. Henry Kruse, Jr.; por Key West, Fla., S-ino Eula Fritz; por Brandeis Universitato, Mass., Ellen Lewis; por Puerto Rico kaj Japanujo, Ann Bodine. Estis seriozaj paroladoj en Esperanto pri *Mondvida Tago* prezentita de James W. Deer; pri *Esperantaj Spertoj Tra la Mondo* de Joseph H. Casto; pri *Vojaĝoj kaj Observoj en Aliaj Landoj* de S-ro Simkins el Anglujo. Estis amuzoj kaj oportuno por ekzerco de Esperanto sub direkto de Ges-roj Donald kaj Mavis Kvernvik. Estis festa Bankedo dum kiu S-ro Kvernvik regalis la ĉeestantojn per novaj kaj malnovaj ŝercoj, kaj kie estis prezentita la nova sonfilmo en koloro pri Aŭstralio. Oportune okazis, ke unu el la gastoj ĉe la festeno estis sinjoro el Aŭstralio, kiu poste tre afable respondis al multaj demandoj. Estis plena budo de Esperantaj libroj, kie membroj povis vidi librojn klasikajn, modernajn, kaj plej nove eldonitajn, kaj kie du amikaj junuloj de ESPO, Tom Davidson kaj Richard Kerr, energie kaj serveme kaptis ĉies monon! Estis bela socia renkontiĝo, kafotrinkado kaj babilado unu matenon en kratero de malnova vulkano. Estis gaja tut-taga ekskurso al la Monda Foiro en Seattle kun agemaj gejunuloj, kiuj kantis Esperante kaj kiuj revene manĝis grandan, spicitan fumaĵitan kolbason dum la aŭtobuso portis nin, laŭ diro de la veturigisto, "rekte al San Antonio, Texas."

Sed ne ĉiuj kongresanoj estis novuloj kaj junuloj. Ankaŭ ni havis la oportunon honorigi du malnovajn pionirojn de Esperanto: S-ro George W.MacKenzie el Vancouver, Kanado, kiu estas 90 jarojn juna, kaj kiu lernis Esperanton en la jaro 1900; kaj D-ro Ernest C. Pierce el Portland, kiu lernis Esperanton antaŭ 60 jaroj kaj en postaj jaroj travojaĝis Usonon farante prelegojn pri Esperanto.

Prezidis dum la diversaj laborkunsidoj S-ro James W. Deer, kvieta sed ideoplena Prezidanto de ESPO; kaj dum la aferkunvenoj de EANA, S-ro J. Henry Kruse, Jr., membro de la Estraro de EANA. La gazetaro de Portland (*The Oregonian, The Reporter, The Journal*) presis longajn kaj informplenajn artikolojn pri Esperanto kaj pri intervjuoj kun Ges-roj Connor kaj S-ro Donald Kvernvik, Estro de Informa Fako de ESPO.

Entute 70 personoj partoprenis en gaja, memorinda Kongreso en belega, plaĉa ĉirkaŭaĵo. Dankojn ni ŝuldas al ĉiuj membroj, kiuj tiel bonkore subtenis la Kongreson kaj certigis al ĝi grandan sukceson!

### RESUMO EL RAPORTO DE LA ĜENERALA SEKRETARIO

***George Alan Connor***

La Centra Oficejo funkciis dum pasinta jaro kun iom malpliigita stabo pro la fakto, ke kaj S-ro Myron M. Mychajliw kaj S-ino Doris T. Connor laboris plentempe en aliaj okupoj. Tamen estis vigla korespondo kaj servo al la membroj. Ne estis eble eldoni gazeton, sed diversaj Bultenoj estis forsenditaj, kaj ni anticipas en sekvonta jaro komenci regulan eldonon de AE. Membroj ĝenerale daŭre subtenis la Asocion finance, sed ne plu estas eble pagi salajrojn. Specialan subtenon donis Joseph H. Casto, kiu kontribuis finance pli ol $400 por sendi la libron *Esperanto: The World Interlanguage* kaj Jarkolekton de AE al bibliotekoj tra la tuta lando. Ankaŭ 12 personoj kontribuis kiel membroj de la Subtena Kaso kaj donacis sumojn de$3 ĝis $10 monate al EANA. Testamento de mortinta amiko de EANA provizas proksimume $500 ĉiujare al

EANA, kiu sumo reprezentas rentumon el bonaj akcioj, kiujn li donacis al EANA.

La nombro de membroj je la jarfino 1961 estis 644. En Junio 1962 estis 561, sed ni anticipas atingi almenaŭ saman ciferon de 640-650 je fino de la jaro. Ni daŭrigas kolektadon de valoraj libroj por la EANA Biblioteko, kaj nun havas preskaŭ du mil volumojn kaj grandan arkivon de gazetoj de la tuta mondo. La espero estas, ke tiu Biblioteko restos porĉiame la pasedaĵo de EANA kaj la Esperanto-movado.

Esperantaj kursoj estis organizitaj per helpo de la Centra Oficejo en pli ol 20 lokoj. Granda aktiveco montriĝis en Puerto Rico sub direkto de D-ro Agrait-Marty. Eĉ helpo de EANA iris al malproksima Etiopio kaj Lebanono, kie membro de Subtena Komitato de EANA, D-ro Lee-Min Han, organizas kursojn kaj klubojn.

Ĉiuj aferoj de la Asocio funkciis sufiĉe bone, spite de diversaj malfacilaĵoj, kaj la provizora laboro de S-ino Connor en alia okupo. S-ino Connor nun denove laboras plentempe en la oficejo de EANA, kaj la jaro 1963 montros novan vigliĝon pro tio kaj pro la eldonado de la gazeto AE komence de la nova jaro.

*REZULTO DE ELEKTOJ:* Dum la Kongreso, balotiloj – tiuj, kiuj envenis per poŝto kaj tiuj donitaj dum la Kongreso – estis malfermitaj kaj kalkulitaj. Kalkulistinoj, Annette Greenland kaj Viola Aho, raportis, ke la jenaj estas elektitaj: Kasisto, *Doris T. Connor*, New York, N.Y., per 182 voĉoj; Asocia Membro de la Estraro de EANA, *J. Archie Johnson, Jr.*, Savannah, Ga., per 178 voĉoj. Ni kore bonvenigas la du nove elektitajn membrojn de la Estraro de EANA. Ili servos dum la daŭro de tri jaroj.

## GOOD NEWS FOR 1963! EANA MOVES TO LARGER QUARTERS AND RENEWED PUBLICATION OF "AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE"

You will recall that in our Spring and Summer Bulletins, we mentioned the necessity for removal of the EANA office to new quarters, and the temporary difficulties resulting from present arrangements. All these problems have now been resolved, since our delightful 51st EANA Congress in Portland, Oregon. Outstanding members of ESPO (Esperanto Society of Portland, Oregon) aided us in finding an ideal solution right in Portland. It consists of a two-story house plus good sized basement, giving approximately three times the amount of space we have been crowded into here in New York City. There will be assistance from enthusiastic Esperantists in Portland and, best of all, it has been decided to concentrate upon regular publication of "American Esperanto Magazine" beginning with the new year 1963. The first order of business will be the magazine henceforth.

The new "Esperanto-Domo" (yes! it happens to have been painted green!) will solve many problems which have hung over our heads like the sword of Damocles these past few years. Please note the new address for *AFTER DECEMBER 1st, 1962*, and if you wish an efficient short form, we suggest:

*ESPERANTO*
*1837 N. E. 49 Ave.*
*Portland 13, Oregon*

YOU will want the magazine AE beginning in the new year. And we trust that each and every one of you will send in your RENEWAL of membership through the year 1963, to aid in getting the big "new deal" well organized. You will have all the best features of the AE as usual, plus some new ones, and when sufficient numbers send in their memberships and support, we can hope for eventual 32-page issues such as we had some few years ago. See the *RENEWAL COUPON* which we enclose herewith, and *renew early NOW. Note that for immediate attention and early renewal we give an added premium in books (described in accompanying Renewal Slip).* DON'T WAIT! SEND NOW! The magazine will be our major concern in 1963.

NOTE ADDRESS UP TO DEC. 1 – *Esperanto, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.*

AFTER DEC. 1 – *Esperanto, 1837 N. E. 49 Ave., Portland 13, Oregon.*

All mail will be forwarded to us if addressed to New York after December 1st.

As we await your renewal and support for office and magazine in Portland, let us send our cordial greetings now, for the coming season:

ĜOJAN KRISTNASKON KAJ FELIĈAN NOVAN JARON AL VI KAJ LA VIAJ

George & Doris Connor, Secretaries
Esperanto Association of North America